

Esperanto en Skotlando

Esperanto in Scotland – Esperanto ann an Alba
Printempo 2016 - £2.50/€3



Enhavaj Elstarajoj – “Delphi” de Albert Goodheir enangligita –
La Inventaĵo Kiu Kreis la Modernan Mondon

Esperanto en Skotlando

Numero 203 - Printempo 2016 -ISSN 0014-0643

Redaktoro: Ed Robertson

Redakcia adreso: 52 Easter Drylaw View,

Helpredaktoro: Hju Rid

Edinburgh, EH4 2QP

Administranto: Mia Casey

Telefono: 07970 156549

Rete: ed.robertson@esperanto.org.uk

La redakcio bonvenigas kontribuaĵojn ĉiaspecajn: artikolojn, novelojn, novaĵojn, recenzojn, poemojn, leterojn, ktp. Limdato por la venonta kajero de **Esperanto en Skotlando: 30a de septembro 2016**. Oni sendu kontribuaĵojn elektronike kiel simplan tekston aŭ uzante la formaton OpenOffice.org Writer aŭ LibreOffice Writer (senpage haveblaj de la koncernaj retejoj). Dokumentoj en la formato Word ankaŭ estos akceptataj. Se la formato aŭ tiparo uzata en via kontribuo ne subtenas ĉapelitajn literojn, diversaj surogataj sistemoj estas akcepteblaj.

Enhavo

El Katedro.....	3
Kvar Famaj Homoj: Jean Bisset.....	7
Babilado kun Dio: Anonima (elangligis Ed Robertson); Daŭrigo.....	9
Delphi: Albert Goodheir (enanglis Donald Robertson).....	13
Granda Maria de la Kantoj: Charlie Dornan.....	15
2017 – Ne nur Zamenhof-jaro!: Ed Robertson.....	21
La Inventaĵo Kiu Kreis la Modernan Mondon.....	29
Tradukaj Defioj.....	37
Kalendaro.....	38

La opinioj esprimitaj en Esperanto en Skotlando ne nepre kongruas kun tiuj de Esperanto en Skotlando aŭ EAS. Esperanto en Skotlando estas publikaĵo de la

Esperanto-Asocio de Skotlando: SC042398

Prezidanto: Duncan Thomson

Vic-Prezidanto: Ed Robertson

Sekretario: David Bisset

Kasisto: David Hannah

Adreso: 47 Airbles Crescent,
Motherwell, ML1 3AP

Telefono: 01698 263 199

Rete: secretary@skotlando.org

El Katedro

Vi eble notis literstilan ŝanĝon en la pasinta numero de *Esperanto en Skotlando*. Ni agas kaj lernas. La nova redakta kolektivo ankoraŭ alkiutimiĝas al lastatempe adoptita teknologio kiu fulmrapidigas la laboron por kunmeti nian revuon. Malgraŭ tio ke la litergrando ŝajnis 12 punktoj, ĝi tamen aperis multe pli malgranda en fina presita formo. Iuj legantoj plendis ke tio malfaciligis ilian legadon kaj, ĉiam dezirantaj komplezi, ni eksperimentis per diversaj grandoj, decidintaj uzi la nunan aperantan. Plia konsidero estis tio ke presstilo efikas al la leg-facileco de tiuj kiuj suferas pro disleksio. La du plej rekomendindaj presstiloj por helpi disleksiuloj estas uzo de litertipo sen-serifa kaj tio ke la dekstra tekstoflanko estu ĉifona. Tial nia revuo havas la aperon kiun vi nun vidas. Se vi havas iujn komentojn aŭ rekomendojn bonvole sendu al hju_rid@yahoo.co.uk.

La unuan fojon dum jardekoj, la suno nun ŝajne iomete ekbrilas por Esperanto en la anglalingvaj landoj. La interreta kurso pri Esperanto por anglalingvanoj en la retejo Duolingo dum la 10 monatoj de post sia lanciĝo allogis nun pli ol trionon de miliono da kursanoj, el ĉie en la mondo, inter ili ne nur denaskaj parolantoj de la angla. Dum marto 2016 Duolingo aljuĝis la kurson stabila, kaj rajtigis ĝin "diplomiĝi" el la "beta-"(prov-)fazo. Laboro ĉe la kurso daŭros tamen por la tri kurs-"moderatoroj" (inkluzive min), kaj la sep aliaj kursteamanoj, dum ni (ĉiuj nepagitaj volontuloj) daŭre evoluigos pli kaj pli bonajn versiojn de la kurso. Laboro daŭros ankaŭ ĉe la pretigo de Duolingo-kurso pri Esperanto por hispanlingvanoj, kiu estas nun 80%-e finita, kaj ĝi verŝajne lanciĝos post pliaj du monatoj aŭ io tia. Homoj parolas pri la eventuala ebleco de kursoj pri Esperanto ankaŭ por parolantoj interalie de la rusa, la germana, la ĉina, la franca, kaj la portugala.

Tamen, oni rajtas demandi: ĉu tiuj evoluoj kondukas al novaj AKTIVAJ uzantoj de Esperanto, kaj ne nur al provizoraj lernantoj? La respondo al tiu demando estas laŭta JES. Jam aperas la vizaĝoj de junaj kursfinintoj ĉe Esperanto eventoj, ekzemple ĉe la ege sukcesa Brita Kongreso de Esperanto okazinta lastatempe en Liverpool, kaj pli amase en Usono. Esperanto ĉiam utilis por tiuj, kiuj parolas ĝin. Krome, ĝi estas interesa ŝatokupo; ĝi helpas malfermi la pordon al la cetera mondo. Ĝi ĉiam estis nur parta ŝlosilo al tiu cetera mondo: bezonatas ankaŭ malfermiteco al aliaj kutimoj, aliaj kulturoj, kaj, jes, aliaj lingvoj. Duolingo estas ilo kiu allogas homojn ne nur por lerni Esperanton, sed por lerni multajn aliajn lingvojn. Esperanto ja estas alloga por homoj kiuj interesas pri aliaj lingvoj kaj aliaj kulturoj.

Por kelkaj, malmultaj, homoj, tamen, Esperanto bedaŭrinde ne fariĝis ilo inter aliaj rimedoj por pli bona mondo aŭ por persona evoluo, sed aparta celo en si mem, sinteno internenrigardanta kaj nekapabla evolui por mondo en kiu ja jam abundas aliaj rimedoj por internaciaj kontaktoj. Por ili, ĝi estas krucmilito kontraŭ "perfidaj" politikistoj, kontraŭ anglalingva kulturo, eĉ anstataŭaĵo por la lernado de "fremdaj" lingvoj kaj kulturoj entute. Ilia "fina venko" venos per ia fantaziata decido de tiuj samaj politikistoj "enkonduki" nian lingvon kiel duan lingvon por ĉiu, ĉu la homoj volos aŭ ne, evento kiu neniam okazos krom en sonĝoj. Pli da prestiĝo venos por Esperanto nur, kiam ĝi havos pli da parolantoj; tio estas, ĝi venos, nur kiam Esperanto havas ian signifon en la mondo kaj meritos ian prestiĝon.

Unu sakstrato de la Esperanto-"movado" antaŭ iom da tempo estis la taktiko propagandi petskribon al la EU-instancoj, ke ili "enkonduku" Esperanton, sen pripensi ĉu nia lingvo estas ankoraŭ sufiĉe signifa por meriti tion aŭ ne. Eĉ pli freneze, ili havis la ideon kandidatiĝi por Esperanto en EU-baloto kun nia lingvo kiel sola

politika propono al la voĉdonantoj. Kompreneble la manko de subskriboj kaj voĉoj ricevitaĵas montras nur kiel malmulte ni meritas tiun "enkondukon". Multe pli utila kaj saĝa ideo estus traduki la terminarojn de la EU-instancoj en Esperanton. Tiam ni povus almenaŭ montri ke nia lingvo taŭgas por la tasko pri kiu ni pretendas. Klare, meti la ĉaron antaŭ la ĉevalon neniam kapablas plenumi la taskon. La katalunoj ja jam tradukis la EU-terminaron en la katalunan, kaj ilia lando eĉ ankoraŭ ne estas rekonata sendependa membro de EU, sed ili almenaŭ estas pretaj por tiu tago.

Se ni esperanto-parolantoj volas, ke nia lingvo ĝuu pli grandan disvastiĝon, tiam bezonatas, ke ni estu interesaj homoj, kiuj parolos pri interesaj aferoj. Precize tio ja okazis en tiu lastatempa brita kongreso, kun interesaj eksterlandaj gastprelegantoj, amuza komedia kvizo kaj aliaj ĝuindaj programeroj en amika kaj bonveniga etoso; precize tio okazos en nia propra skota kongreso en Pollokshaws en junio, kaj en la tutkelta kongreso en Bretonio en aŭgusto, kaj konstante dise tra la cetera mondo.

Tamen, eble iuj el vi aŭdis la bizaran kaj idiotan intervjuon en Radio Scotland en kiu iu Brian Barker ŝajnis esti proparolanto de la "Esperanto Association". Liaj respondoj al la demandoj de la program-prezentisto estis cinikaj kaj embarasigaj, kaj tiu Barker faris nenion krom ŝajnigi esti strangulo kaj sektano, kiu kapablis doni nenion pozitivan pri Esperanto. Li nur kulpigis politikistojn, ke ili ne "enkondukis" Esperanton en lernejojn, kaj mensogis ke "150 ĉeestantoj kunvenas ĉi-semajnfine en Liverpool". Tiu Barker eĉ ne estas ano de la Esperanto-Asocio de Britio kiun li pretendis reprezenti, do certe ne parolas por ili, kaj certe ne estas ano de la Skota Esperanto-Asocio, do ne havas ian rajton paroli por ni kaj embarasi nin en nia propra radio. Plej bizare estis, ke lia kontakto kun la reala mondo eĉ ne sufiĉis por doni al li ian informon pri la

kongreso, por kiu li "varbis", ĉar LA KONGRESO ESTIS JAM OKAZINTA, NE EN TIU SEMAJNFINO AL KIU LI ALUDIS, SED JAM UNU SEMAJNON ANTAŬ LIA INTERVJUO!

Kion diri pri li, kaj pri tiu alia "fantomo" kiu hantas la movadon kun siaj fantazioj pri enfiltrintoj senditaj de MI5 por subfosi Esperanton? Mi emas pensi pri la vortoj de Ivo Lapenna (1909-1987): "For la stranguloj!". Tamen tiom malmultaj homoj ne plu gravas, ne meritas tian atenton, eĉ kiam ili sukcesas entrepreni pretendon reprezenti nin. La moderna Esperanto-movado postlasis ilin en la pasinteco al kiu ili apartenas. Tamen, kelkfoje mi pensas, ke estas domaĝe, ke ni ne povas simple ŝanĝi la nomon, kaj ŝajnigi ke tiaj idiotoj neniel rilatas al ni.

Ed Robertson

Kvar Famaj Homoj: Jean Bisset

Tiu ĉi artikolo traktas la ligan inter kvar homoj. La unua estas Stanley Nisbet; John Francis kaj Kris Long sekvas – tri bone konataj Esperantistoj. La kvara viro kun kiu la afero fakte komenciĝis estas George Mackay Brown, elstara aŭtoro kaj poeto el Orkadio.

Ni komenciĝas kun Stanley Nisbet kiu dum jaroj admiris la verkojn de George Mackay Brown; kaj li havis la ideon traduki kelke da la rakontoj de li; do li skribis por peti permeson. Li ricevis entuziasman respondon. Kaj li ne volis ricevi monon! Treege plaĉis al la aŭtoro. Li diris ke li estus ege feliĉa se Esperantistoj tutmonde povus ĝui liajn rakontojn kaj poemojn. Do Stanley preparis malgrandan libron kiun li nomis “Andrina” – la titolo de la unua novelo en la libreto. Ĝi vere estas bela, dolĉa fantomeca rakonto – sed vi devus legi ĝin por vi mem!

Estas du aliaj rakontetoj en la libro – La Radiofono kaj La Maskita Fiŝisto. La Radiofono estas amuza sed ankaŭ havas tragikan finon. La Maskita Fiŝisto bone montras la malfacilaĵojn de vivo en la insuloj sed ankaŭ havas preskaŭ magiajn, miraklajn elementojn. Laŭ mi ĝi havas simbolajn trajtojn.

Nu la alia viro kies tradukoj aperas en la libro estas Kris Long el Anglio. La tasko kiun li prenis estis la tradukado de dudek unu poemoj. Lia tasko estis grava kaj laŭ mi, malfacila.

Nun kelke da vortoj pri John Francis. John ege kapablis pri la tradukarto. Li ankaŭ loĝis dum kelke da jaroj en Orkadio kaj kiam mi petis lin traduki certan poemon li volonte akceptis la taskon prepari ĝin por la centa Skota Kongreso en Largs kie Stephen Thomson deklamis ĝin sur la insulo Millport. Mi unue aŭdis la poemon en la angla en Pitlochry Festival Theatre. Tie la aktoro prenis la rolon de

maljuna vagemulo Ikki Faa, kiu, sciante ke li baldaŭ mortos, decidis ke li devas prepari sian testamenton. Li lasis la akvon en la rivereto al iu sinjorino kiu ofte preparis tason da teo por li, al iu knabineto kiu ĉiam ĉarme salutis lin, li lasis la florojn en la kampoj. En tiamaniero la testamento daŭris. Por atestantoj li havis paseron kaj muson kiuj lasis iliajn spurojn en la neĝkovrita koto en la fosaĵo. La poemo estis kortuŝa. Bedaŭrinde la leĝo de kopirajto malpermesas al ni presi eĉ la Esperantan version!

Babilado kun Dio: Anonima (elangligis Ed Robertson); Daŭrigo

... daŭrigo el Esperanto en Skotlando numero 202

„Mi supozas, ke tio ja estas iaspeca gvidlinio, do mi jam devojiĝis de mia dumviva kutimo!”

„Serioze, tamen, specioj kiuj daŭre algluiĝas al religio post la vendolimdato tendencas esti la plej verŝajnaj kandidatoj por memdetruo. Ili malŝparas tiom da energio disputante pri mia vera naturo, kaj investas tiom da emocio je ilia freneze eraraj mensaj bildoj, ke ili finiĝas en reciproka mortigado pri diferencoj pri difinoj de io, pri kio ili ne havas ideon.”

„Kial mi? Kial elekti el ĉiuj eblecoj nome min, ateiston? Kial vi rakontas al mi ĉion ĉi? Kaj kial nome nun?”

„Kial vin? Ĉar vi kapablas akcepti mian ekziston sen ke via ego kolapsus kaj vi rampus antaŭ mi kiel miskonduta infano.”

„Ĉu vi povas serioze imagi al vi kiel reagus la Papo al la realeco de mia ekzisto?! Se li vere komprenus kiom de la doloro kaj suferado estas kaŭzita de lia religio li tuj ekhavis koratakon! Aŭ se mi aperus 'rekte' antaŭ tele-evangeliisto kiel Pat Robertson li pirus en la pantalonon.

Male, via intereso estas pure akademia. Vi neniam akceptis la fabelon. Vi divenis ĝuste, ke dieco estas la sorto de vivo. Ŝajnis al mi racie, konfirmi viajn suspektojn, kaj permesi al vi fari kion vi volas kun tiu informo, supozeble publikigi nian konversacion en la reto.

Kial nun? Nu, parte ĉar vi, kaj la interreto, estas nun ambaŭ pretaj. Sed ĉefe ĉar la homa raso nun eniras decidigan fazon. Kiam tio okazos la estonteco povas evolui laŭ tri malsamaj vojoj.

Multaj inteligentaj specioj evitas la danĝeron per evitado de la danĝero. Same kiel la adaptantoj, ilin atendas estingiĝo, ofte sufiĉe agrable ene de la limoj de sia propra planedo.

Multaj ne lernas bridi sian misuzadon de sciakirado ĝis la skatolo de Pandora eksplodiĝas antaŭ iliaj vizaĝoj.

Atingas al Nivelo Du nur rasoj kiuj lernas kunvivi kun sia plej danĝera scio. Ĉiu individuo devas finfine kapabli detrui sian propran specion iam ajn, kaj lerni kiel regi sin por kapabli supervivi eĉ tian mortigan sagacon. Efektive nur tiajn ni vere volas vidi ekster siaj propraj sunsistemoj.

„Kial ne povas esti kvara ebleco – selektema esplorado, kie ni evitas esplori danĝerajn vojojn de scio?”

„Apenaŭ ekzistas tia vojo. Nepras energia pluso por kompletigi ĉi tiun fazon de via socia evoluo, kaj elimini malriĉecon. Ĉiuj regindaj teĥnologioj: nuklea fuzio, nano-inĝenierita fotosintezo aŭ hidrogenciklado malfermas eblecojn de danĝeraj armiloj, kiujn viaj militsciencistoj sendube trovos. Vi eble ne supervivos tiujn, tamen.

Simile, postnelonge vi konkeros biologiajn malsanojn kaj eĉ reinĝenieros vin por esti pli malpli sendifektaj. Viaj biologiaj vivolongoj duobliĝos aŭ triobliĝos ĝis potencilaj senlimaj dum la venontaj ducent jaroj: SE vi supervivos la potencialan minacon kiun proponas la sama teĥnologio.

Vi simple ne kapablas ekhavi la bonojn sen fari la riskojn.”

„Mi ne scias, ĉu mi komprenas mian rolon en ĉi plano. Mi publikigu ĉi konversacion rete, kaj ĉio estos en ordo, ĉu?”

„Ne nepre. Oni rigardos ĝin kiel ete amuzan fikcian verkon. Fakte, viaj vortoj, ne estos komprenataj ĝis la ideoj kiujn vi celas esprimi maturiĝos. Tiam oni traserĉos la arĥivejojn. Ili

trovos ĉi tiun verkon vian, kaj ĝia klarvido frapos ilin. Oni taksos vin samranga kiel Johano la Baptisto!

Tiu artikolo ne kaŭzos la maturiĝon, la antaŭenpaŝojn, sed ĝi ja tamen helpas al vi rekoni tiujn paŝojn.”

„Ĉu mi rajtas demandi, kiuj estos tiuj antaŭenpaŝoj?”

„La unua, kiel ni diskutis, estas la invento de la flugmaŝino. La venonta signifa fazo estas la evoluo de la pensmaŝino. Ĝi indikas, post kelkaj jardekoj, vian unuan paŝon sur la vojo de teknika evoluo. La bildigo de la homa genomo estas alia klasika vojsigno, sensencaĵo tamen sen kompreno. Vi devos 'malingenieri' la DNA-kodon por komenci la taskon desegni vin biologie kaj ciferece. Sed tiu tasko postulas la pensmaŝinon.”

„Vi diras, ke vi evitas intervenon. Sed ĉu ĉi tiu konversacio ne konsistigas intervenon – eĉ se homoj kiuj vivas nun malatentas ĝin?”

„Jes, sed nur ĝis ĉi tie mi pretas riski iri. Ĝia sola efiko estos konfirmi al vi, se vi trovos la vojon, ke ĝi estas la ĝusta. Navigi la danĝerojn restas la tasko nur de vi solaj.”

„Tamen, kial ĝeni vin eĉ diri tion? Certe tio estas nur aldona barilo sur la vojo de evoluo. Aŭ ni sufiĉe taŭgos aŭ ne...”

„Biologiaj inteligentoj forte kredas ke konscio estas konceptebla nur ene de organika cerbo. Akcepti la konsciiĝon, ke vi kreis vian posteulon en la kolektiva senco ke la specio mem fariĝis senutila, tiu paradigmo ŝanĝiĝo estas por multaj tro. Ili malsukcesas kaj estingiĝas.

Mi esperas, ke se mi kapablas enkapigi al homoj la koncepton, ke mi mem estas produkto de precize tiuspeca evoluo, ili ekhavas la memfidon provi. Multaj specioj ĉe Nivelo Du konsentas kun mi ke ĉi tiu nuna kubutigo kapablas pliigi

taŭgajn konkursantojn por Nivelo Du. Mi provis ĉi tion en 312 kazoĵ. Ni ankoraŭ kalkulas la efektivajn benojn, tamen ĝi kontribuis pliigon de 12% al la kvanto de biologiaj specioj kiuj emas al la transiro al informospecioj.

„Bone, do kio se ĉiu subite serioze pripensus kion mi dirus, kaj kredus ĉiun vorton kiun mi diras? Ĉu tio ne konsistigus eĉ pli drastan intervenon?”

„Fidu min. Ili ne faros tion.”

„Tamen, restas ankoraŭ la ebleco, ke se alia asteroido survojas al ni, vi faros nenion por malhelpi ĝin por ni, ĉu?”

„Mi memfidas ke vi sukcesus en tia testo. Kaj nun, mia amiko, la interparolo estas finita, vi demandis al mi aron de la ĝustaj demandoj, kaj mi diris tion, kion mi celis diri dum mia vizito, do mi nun foriros. Estis tre agrable konatiĝi kun vi, kaj vi estas sufiĉe inteligenta. Por formiko!”, li ridetis.

„Nur unu lasta bagatela demando. Kial vi aperis al mi en la formo de tridekkelkjara vira blankulo?”

„Ĉu mi iamaniere timigis aŭ minacis vin?”

„Ne.”

„Ĉu vi trovas min sekse alloga?”

„Certe ne!”

„Do, cerbumu vi mem...”

Delphi: Albert Goodheir (enanglis Donald Robertson)

Rocks, reddening in the evening sun;
on olive trees the cricket trills;
the last bus makes its final run;
an ass brays distantly between the hills.
Fresh water pours between the shiny mountain peaks,
from Parnassus's stony heart the water seeps,
to find its way into the holy spring,
to freshen pilgrims, as they offerings bring,
and making way up steps as old as time,
to purify themselves in temple shrine.
The noise is stilled as day declines,
from ever present now the phantoms call,
where thousands used to worship under pines,
so now their shades trek round the ruined wall,
mute until the living find a voice,
evoking words inspired by thoughts sublime,
which call my name to come and then rejoice,
and praise Apollo, God of light divine,
while Dante stood awhile in Paradise,
and called the ancient Goddess who held sway,
Rhea or Demeter, before all gods, all wise.
But present time continues; the old gods pass away,
their sanctuaries ruined by the acts of hate,
when bigots ruled and then destroyed
the holy symbols that once men employed
to make their sacrifice and gods placate.
And now a darkened world is ruled by fear,
dissent and division and by pain,
Sometimes we sense that anarchy draws near.

Remain as yet the words that Socrates once read,
engraved in stone, on temple wall they said:
'Know yourself'; those words are few,
but lead to wisdom and to life anew.

Today I went northwards in wind driven rain,
beneath autumn beeches, leaves afloat on wet terrain.
Loving memories spring up from deep within my mind,
as I see the sunlit rocks, which glow and brightly shine.
My pulsing blood, freezing cold, as I drink from icy spring,
and I feel upon my cheek, the sting of needles from the pine.

While I am drawing near unto that holy shrine,
on stony ground, well worn through ages past,
raised long ago in ancient times, imperishable,
bears witness through the senses, finds a voice still able,
despite suppression and the arrogance which lasts
in man, the Eternal Delphi.

Granda Maria de la Kantoj: Charlie Dornan

Granda Maria de la kantoj estis gaelparolanta virino de la deknaŭa jarcento kiu aktivis en la tiel nomita *Landa Ligo* (Organizo kiu celis plibonigi la situacion de la etbienistoj de altlanda Skotlando) kaj verkinto de multaj popularaj kantoj.

Ŝia oficiala nomo estis Mary MacDonald/Mairi NicDhomhnaill sed, en la gaela socio oni estas konata per *sloinneadh*. Tio estas via nomo kun la nomo de la patro. Do, ŝi estis *Mairi nighean Iain Bhain*, Maria, filino de blonda Johano. Multaj Gaeloj ankaŭ havas kromnomojn kaj poste, ŝi estis pli bone konata sub la nomo *Mairi Mhor nan Oran*, Granda Maria de la Kantoj. Granda ŝi estis. Ŝi pezis eble naŭdek kilogramojn kaj ŝi altis kvin futojn kaj naŭ colojn.

Ŝi naskiĝis en Marto 1821 en la insulo, Skye, en la vilaĝo *Sgeabost*. Ŝiaj gepatroj estis etbienistoj. Do, neriĉaj homoj. Fakte, antaŭ la naskiĝo de Maria, la patro, pro financaj malfacilaĵoj devis forvendi sian tutan bovinaron ĉe la foiro de Portree. Li intencis elmigri al Kanado kun sia edzino, Floraidh sed fine rezignis pri tio kaj pasigis 12 jarojn en Glasgovo antaŭ ol reiri al *Sgeabost* kie Mairi pasigis sian junecon.

Ŝi forlasis la insulon en 1845 por edziniĝi al Isaac MacPherson kiu estis ŝufaristo en la urbo, Inverness. Tie ŝi loĝis dum multaj jaroj. (En kvartalo kiu nomiĝis *The Maggots* en la norda parto de la urbo). Bedaŭrinde, en la jaro 1871 la edzo ekmortis kaj Mairi devis serĉi laboron por vivteni sin kaj siaj infanoj. (Ŝi naskis sep infanojn el kiuj kvar estis vivaj en 1861).

Ŝi trovis laboron kiel flegistino en Inverness sed baldaŭ ŝin trafis malagrabraĵon kiu ŝanĝus ŝian vivon. Ŝi estis fleganta, en ŝia hejmo, iun Sinjorinon Harriet Turner kiu estis mortonta pro febro. Post la morto de la virino (edzino de iu Captain Turner de la Royal

Engineers) oni konstatis ke mankas kelkaj vestaĵoj de S-ino Turner. Post traserĉo de la domo oni trovis la artikolojn en la kesto de Mairi. Ŝi deklaris sin nekulpita pri tiu krimo sed oni ne kredis ŝin kaj la puno estis 40 tagoj en la malliberejo de Inverness.

Tiam, en 1872, Mairi estis pli ol kvindekjaraĝa. Neniam antaŭe ŝi estis verkinta kanton sed la malliberigo tiom hontigis kaj kolerigis ŝin ke ŝi verkis sian unuan kanton. *Luchd na Beurla*- La Parolantoj de la Angla.

Jen Kelkaj strofoj el la 42 kiujn ŝi verkis en esperanta traduko:

Lacigas min la parolantoj de la angla
Ili vere lacigas min.
Mi sopiras havi varmecon kaj muzikon.
Lacigas min la parolantoj de la angla

En inkubsonĝo mi vidis soldatojn
kiuj ĉirkaŭis min, Captain Turner
kaj du nobelajn virinojn.
Mi timiĝis kaj eksaltis pro teruro

Ili metis min sur malvarman ŝtonan plankon
kaj por kapkuseno ili donis al mi lignaĵon.
La senriproĉa konscienco helpis min tiam.
Ĝi protektis kaj ŝirmis min.

Estis bone ke mi sentis nenian kulpecon.
Mia konscienco ne riproĉis min
Sed kuraĝigis min kiam mi sentis malesperon.

Nian landon malpurigas la ŝafaro el la sudo
Ĝi venas kiel pesto. Estas nek besto nek homo
kiu ne sentas sin turmentata kaj disŝirata.

Tiam, Mairi estis unulingva, ŝi komprenis nur la gaelan kaj ŝi estis konvinkita ke oni traktis ŝin tiom malbone pro la fakto ke ŝi ne parolis la anglan. Sed per tiu kanto ŝi plendas ne nur pri sia propra sperto de maljusteco sed pri la malbona kaj maljusta traktado de la tuta popolo.

Ekde tiam antaŭen, la kantoj ne ĉesis veni. La malliberigo malŝlosis ion en ŝi, por tiel diri.

Post la liberigo ŝi ne longe restadis en Inverness. Ŝi iris al Glasgovo kie ŝi daŭre laboris kiel flegistino. Unue en la Royal Infirmary kie ŝi specialiĝis en obstetiko. Tiu periodo daŭris de 1872 ĝis 1876. En 1876 ŝi tranlokiĝis al Greenock kie ŝi estis distrikta flegistino.

Dum sia restado en Glasgovo kaj Greenock ŝi ĉeestis multajn sociajn eventojn de la gaela komunumo en la centra landparto kaj ŝi ekkonis multajn individuojn kiuj okupiĝis pri la Landa Ligo. Ili luktis flanke de la etbienistoj kontraŭ la terposedantoj. Mairi fariĝis oficiala poeto/bardo de tiu movado. Ne ĉiuj kantoj temis pri la politika lukto de la Landa Ligo. La gaeloj en la centra landparto de Skotlando ĝuis Riĉan socian kaj sportan vivon. Mairi verkis kanton pri matĉo de *Shinty* kiu okazis la unuan de Januaro 1876 ĉe Queen's Park. Jen la kanto – *Camanachd Ghlaschu*

Jen la knaboj kiuj feliĉigas min
Jen la ĝojiga nova jaro.
Jen la knaboj kiuj feliĉigas min.

Jen la kore amataj knaboj
longe for de siaj hejmoj.
nun en la stratoj de Glasgovo.

Antaŭ la nova jaro* estis kunveno.
La matĉo aranĝiĝis.

Vidindaĵoj estas la knaboj
Sendifektaj en buntaj kamisoj

Ĉiu junulo estas fortega, bastono enmane
La pilko fajfas dum ĝi flugas.

Rapidaj kiel cervoj ili estas
Kaj la kriego aŭdiĝas: jen la pilko, Donald.

* de 1876

Ŝi guis aparte bonajn rilatojn kun politikisto Charles Fraser MacIntosh kaj akompanis lin dum lia vojaĝo tra la graflando Inverness kiam li strebis elektiĝi al la parlamento en Londono. La kantado estis grava helpo por MacIntosh inter la unulingvaj gaeoj ĉar anglalingvaj gazetoj kaj flugfolioj tute ne efikis inter la gaeoj. Li elektiĝis kaj ĝuis iom da sukceso en la parlamento pri la rajtoj de etbienistoj kaj la uzado de la gaela lingvo en lernejoj.

Eĉ kiam ŝi loĝis en Glasgovo kaj Greenock ŝi reiris al Skye almenaŭ unufoje jare. Tiel ŝi informiĝis pri la socia kaj politika situacio en la insulo kaj en la altlanda ĉeftero. Fine, en 1882, ŝi reiris por ekloĝi en Skye. Unue en la domo de amikino sed poste en propra domo kiun ŝi ricevis de loka terposedanto kiu simpatiis la celojn de la landa ligo.

En 1891 oni eldonis libron, *Gaelic Songs and Poems by Mrs.*

Mary McPherson. Mairi ne verkis la libron. Oni transskribis la kantojn el la deklamado de Mairi ĉar ŝi estis analfabeta.

Krom la libro, la kantoj de Mairi ankaŭ aperis en gazetoj sed ĉefe, la homoj aŭskultis ilin dum *Ceilidh* kaj parkerigis ilin por kanti al familianoj, najbaroj kaj geamikoj.

La kantoj de Mairi fariĝis popularaj ĉar ili estas pratipaj. Tio estas – ili esprimas la spertojn ne nur de individuo sed de multaj homoj.

Unu el ŝiaj plej konataj kantoj havas la titolon, *Nuair bha mi og* – Kiam mi estis juna. Ĝi estas iom sentimentala tamen ĉarma. La temo estas universala – al ĉiu maljunulo plaĉas memori la junecon.

Mi frumatene leviĝis en majo
La unua taglumo vidiĝis super la montoj.
La bovinoj ĝemis kaj la suno forpelis
la ombrojn de la nokto. Super mia kapo
la ĝentila alaŭdo bele kantis.
Jen la tagoj kiam mi estis juna.

Tie mi plenaĝiĝis sen zorgo.
Kiam mi vagis tra la kamparo la eriko
Gratis miajn krurojn. La cervino
Trovegis en kavaĵo apud la silenta lageto.
Mi piediris tra la erikejo tiel facile
kiel galinago en marĉejo.
La montetoj, kavaĵoj kaj torfaj deklivoj
memorigas al mi kiam mi estis juna.

En mia kapo svarmas memoroj pri tio
kion ni faris: vintraj geedziĝoj, festoj.

Mi iris sen lampo nur brulanta torfaĵo.
La gejunuloj dancadis kaj faris muzikon.
Nun ĉio estas for; la valo estas senhoma.
la urtikoj kreskas kie estis domoj
En la tagoj kiam mi estis juna.

Kiam venis la tago por forlasi mian insulon
la senvela ŝipo faris bruegon kaj ŝi
ekvojaĝis suden.
Mia koro estis rompiĝonta, en miaj okuloj, larmoj.
Mi estis ironta al malgaja lando sen kantoj
sen lekantetoj.
Tie estas nek kardo nek eriko nek junko.
Ec mankas marĉejo.

En 1892 la unua “Mod” okazis en Oban. Mairi tien iris por kanti.
Tamen, ŝi ne gajnis premion ĉar, kvankam ŝi estis talenta verkisto ŝi
terure malbone kantis.

Mairi naskiĝis en Skye kaj tie ŝi mortis en 1898 post mallonga
malsano dum vizito al la urbo, Portree. Tamen, ŝia tombo ne estas
en Skye sed, lau ŝia peto en la Chapel Yard tombejo en Inverness
kie ŝi estis enteriginta la edzon, Isaac MacPherson en 1871.

Se iu leganto volas aŭskulti kelkajn kantojn de Mairi Mhor mi
rekomendas la kompaktdiskon de Catherine Anne MacPhee en
Greentrax recordings – *Catherine Anne MacPhee sings Mairi Mhor.*
CDTRAX 070.

2017 – Ne nur Zamenhof-jaro!: Ed Robertson

Vi eble aŭdis anoncon, ke 2017, centjara datreveno de la morto de Zamenhof, estos Zamenhof-jaro laŭ UNESKO. Tamen, li ne estos la nura kiu tiel honoriĝos en tiu celebros. Fakte estas 52 aliaj kiuj samjare estos celebrataj. Indas ankaŭ por ni iomete kunfesti liajn samcelebranojn, kelkaj el kiuj estas eĉ pli famaj ol Zamenhof mem. Multaj esperantaj publikaĵoj mencios nur lin, tamen estas interese konstati pri la kunhonoratoj, por malkovri en kia kunesto li meritas troviĝi.

Estas diversaj kriterioj kiujn proponoj devas kontentigi por esti inkluzivita en tia celebrosjaro: ĉiu datreveno devas esti *“ligita al la idealoj kaj celoj de UNESKO rilate edukadon, naturajn sciencojn, sociajn kaj homajn sciencojn, kaj komunikadon, kaj devas antaŭenigi pli proksimajn rilatojn inter popoloj, toleremon, kulturalan dialogon kaj reciprokan komprenon”*.

La datreveno devas koncerni *“personecojn de aŭtentike universala statuso, nomumitajn nur postmorte, kaj eventojn de universala aŭ regiona signifo, senkontestebale konataj ekster la limoj de siaj propraj landoj, por respeguli la idealojn, valorojn, kulturalan diversecon kaj universalecon de sia organizo”*. La nomumon devas fari minimume 3 landoj aŭ regiona grupo de landoj. UNESKO honoros en 2017 ne nur homojn (bedaŭrinde, ĉefe virojn!), sed ankaŭ signifajn eventojn.

Jen la plena listo:

200-a datreveno de la naskiĝo de Hovhannes **Aivazovski**, armena pentristo (1817-1900).

350-a datreveno de la unua presita **armenlingva biblio** (Amsterdamo, 1666).

600-a datreveno de la morto de azerbajĝana poeto **Nasimi** (Sayyid 'Imād-ad-Dīn), (1369-1417).

300-a datreveno de la naskiĝo de azerbajĝana poeto **Molla Panah Vagif**, (1717-1797).

200-a datreveno de la **migrado de la Ŝvaboj** al Azerbajĝano kaj Kartvelio.

150-a datreveno de la naskiĝo de **Lev Samojloviĉ Rozenberg**, konata kiel **Léon Bakst**, belarusa artisto, teatro-desegnisto, kaj ornamisto (1886-1924).

500-a datreveno de la komenco de **presado en Belorusio** (1517).

1100-a datreveno de la morto de makedona klerulo kaj verkisto **Kliment de Ohrid** (830-916).

150-a datreveno de la naskiĝo de **Penĉo Petkov Slavejkov**, bulgara verkisto (1866-1912).

400-a datreveno de la morto de **Faust Vranĉić**, kroata klerulo, lingvisto, inventisto, kaj episkopo (1551-1617).

200-a datreveno de la naskiĝo de **Francisco de Albear y Fernández de Lara**, kuba inĝeniero kaj sciencisto (1816-1887).

100-a datreveno de la publikigo de la libro **La Nigraj Sklavoj** de kuba verkisto **Fernando Ortiz Fernández** (1916).

700-a datreveno de la naskiĝo de ĉeĥa reĝo **Karlo (Václav) 4-a de Luksemburgo**, imperiestro de Sankta Romia Imperio, patrono de edukado, arto kaj ekonomia disvolviĝo (1316-1378).

200-a datreveno de la morto de Madame **Anne Louise Germaine de Staël**, franca romanisto kaj eseisto (1766-1817).

100-a datreveno de la naskiĝo de **Jean Rouch**, franca filmfaristo kaj etnologo (1917-2004).

350-a datreveno de la fondiĝo de la **Franca Akademio de Sciencoj** (1666).

200-a datreveno de la naskiĝo de **Nikoloz Barataŝvili**, kartvela poeto (1817-

1845).

150-a datreveno de la naskiĝo de **Käthe Kollwitz**, germana pentristo, grafikisto kaj skulptisto (1867-1945).

300-a datreveno de la morto de **Gottfried Wilhelm Leibniz**, germana matematikisto kaj filozofo (1646-1716).



Portreto pri Leibniz

2400-a datreveno de la naskiĝo de **Aristotelo**, greka filozofo kaj sciencisto (384 AKE - 322 AKE).

1700-a datreveno de la naskiĝo de Sanktulo **Martin de Tours**, hungara episkopo kaj militrifuzinto (316 -397).

50-a datreveno de la morto de **Zoltán Kodály**, hungara komponisto (1882-1967).

50-a datreveno de la **Internacia Hindoceana Ekspedicio (IIOE)** pro esploroj kaj eksperimentoj pri la oceano dum la periodo 1962-1965.

50-a datreveno de la morto de Doktoro **Homi Jehangir Bhabha**, hinda sciencisto (1909-1966).

700-a datreveno de la verkado de la libro de irana verkisto **Golshan-e Razby Sheikh Mahmūd Shabestari** (1317).

1050-a datreveno de la naskiĝo de **Seyyed Morteza Alamolhoda**, irana sciencisto (966-1044).

1150-a datreveno de la naskiĝo de **Muhammad Zakariyā Rāzī**, irana kuracisto, ĥemiisto kaj filozofo (866-925).

150-a datreveno de la naskiĝo de **Aliĥan Bukejĥanov**, kazaĥa ŝtatestro kaj sciencisto (1866-1937).

1000-a datreveno de la fondiĝo de la urbo **Almato**, antaŭa ĉefurbo de Kazaĥio (ĝis 1997) kaj nuna kultura, eduka, scienca kaj financa centro.

150-a datreveno de la naskiĝo de **Janis Rozentāls**, latva pentristo (1866-1916).

100-a datreveno de la naskiĝo de **Algirdas Julius Greimas**, litova lingvisto (1917-1992).

150-a datreveno de la fondiĝo de la meksika **Nacia Konservatorio de Muziko** (1866).

50-a datreveno de la morto de **Milo Milunović**, montenegra pentristo (1897-1967).

150-a datreveno de la naskiĝo de la nikaragva poet **Rubén Darío** (1867-1916), kaj 100-a datreveno de lia morto.

150-a datreveno de la naskiĝo de **Abdullah bin Humaid Al Salmi**, omana socia reformanto kaj sciencisto (1867-1914).

1000-a datreveno de la naskiĝo de **Abu Mohammed Abdullah bin Mohammed al-Azdi** (Ibn al-Thahabi), omana sciencisto.

200-a datreveno de la morto de **Tadeusz Kościuszko**, pola politikisto (1746-1817).

100-a datreveno de la morto de **Ludwik Zamenhof**, pola kuracisto kaj lingvisto (1859-1917).

100-a datreveno de la morto de **Ștefan Luchian**, rumana pentristo (1868-1916).

100-a datreveno de la morto de **Titu Maiorescu**, rumana literatura kritikisto kaj politikisto (1840-1917).

250-a datreveno de la naskiĝo de **Nikolaj Miĥajloviĉ Karamzin**, rusa verkisto (1766-1826).

150-a datreveno de la fondiĝo de la **Moskva Ĉajkovskij-Konservatorio** (1866) Rusio.

150-a datreveno de la naskiĝo de **Vasilij Vasiljeviĉ Kandinskij**, rusa pentristo (1866-1944).

350-a datreveno de la naskiĝo de **Ján Kupecký**, slovaka pentristo (1667-1740).

200-a datreveno de la naskiĝo de **Jozef Miloslav Hurban**, slovaka verkisto kaj filozofo (1817-1888).

400-a datreveno de la morto de **Miguel de Cervantes**, hispana verkisto (1547-1616).



Monumento al Cervantes

400-a datreveno de la naskiĝo de **Bartolomé Esteban Murillo**, hispana pentristo (1617-1682).

100-a datreveno de la naskiĝo de **Gafar Valamat-Zade**, taĝika koreografiisto (1916-1993).

1250-a datreveno de la naskiĝo de **Hakim at-Tirmizi**, taĝika sciencisto (756?-869).

100-a datreveno de la naskiĝo de **Puey Ungphakorn**, tajlanda edukisto kaj ekonomiisto (1916-1999).

150-a datreveno de la naskiĝo de **Chao Phaya Prasadej Surendrathibodi** (M.R. Pia Malakul), tajlanda edukisto (1867-1916).

50-a datreveno de la morto de **Mehmed Fuad Köprülü**, turka klerulo (1890-1966).

850-a datreveno de la morto de **Khoja Ahmed Yasawi**, turka poeto kaj sufiisto (1093 aŭ 1103-1166).

La Inventaĵo Kiu Kreis la Modernan Mondon

Pri kiu inventaĵo temas? Ĝi aperis en sia moderna formo dum la 1880-aj jaroj, sed la ideo jam aperis plurfoje antaŭe; komence ĝi estis ĉefe eŭropa fenomeno, sed ĝi rapide disvastiĝis al aliaj mondopartoj; ĝi estis ilo, kiu permesis al homoj ekkoni la mondon preter siaj apudaj horizontoj. Pri kio temas? Ĉu pri Esperanto? Nu – ja povus esti, sed ne: temas pri la biciklo.

La originoj de la biciklo estas iom nebulaj, kaj iom dependas de la preciza difino de “biciklo”. Tamen la unua stirebla durada veturilo rekoneble bicikleca estis la “kurmaŝino” (germane *Laufmaschine*) kiun patentigis Karl Drais de Mannheim (DE) en 1818. 1816 estis la tiel nomata “jaro sensomera” pro la vulkanerupto de monto Tambora en Balio. Rikoltoj malsukcesis tra la mondo, ĉevalojn oni mortigis pro manko de manĝo, kaj kelkaj opinias ke la kurmaŝino aperis ĝuste pro tio.



La kurmaŝino mem estis peza, kun ligna kadro, lignaj radoj kun feraj ĉirkaŭradoj. Ĝi havis du radojn kaj selon kaj simile al moderna biciklo la rajdanto stiris la antaŭan radon por ekvilibrigi ĝin, Tamen la pelforto estis rekta puŝo sur la tero per la piedoj: tial la nomo “kurmaŝino”. La teĥnologio de la kurmaŝino estis de furgonoj kaj ĉaroj: ligno kaj fero, kaj tio igis ĝin peza; malgraŭ tio, oni povus veturigi ĝin je 12 km/h sur la malbonaj stratoj de la epoko. Pro ĝia alta prezo ĝi estis ludilo por dandaj riĉuloj (tial la angla nomo *dandy horse*). Tamen ĝi sufiĉe rapide disvastiĝis por esti malpermesita en diversaj urboj – inkluzive Londono, Kolkato kaj Novjorko – pro la supozitaj danĝeroj al piedirantoj.

Verŝajne tio, kun prezo kaj pezo kontribuis al ĝia preskaŭa tuta malapero. Alia kialo estis granda konkuranto – la fervojo.

Dum pli ol 40 jaroj la biciklo ne progresis. Tamen dum la 1860-aj jaroj, en Francujo, aperis la venonta paŝo: iu (historio ne certas ĉu estis Pierre Michaux, la fratoj Olivier aŭ Pierre Lallemond) aldonis pedalojn al la antaŭa rado. Pedaloj mem ne estis novaj: ili jam aperis en Francujo sur tricikloj preskaŭ cent jaroj pli frue. Tio kio ja certas estas ke la pedalbiciklo furoris, malgraŭ la peza furgona teĥnologio (ĝi pezis pli ol 25 kilogramojn) kaj la alta prezo. Fine de la jardeko estis pli ol 100 fabrikantoj en Francujo, kaj la firmao de Michaux fabrikis pli ol 200 jare. Ĝi povus atingi 20 km/h, sed ne komforte – sur la vojoj tiutempaj la lignaj radoj kaj kadro ne kusenigis la rajdanton kaj la angla nomo estis ostoskuilo (*boneshaker*).




Notindas ke ekzistas pluraj popularaj mitoj pri la inventinto de ĉi tia biciklo: skotoj ofte asertos ke ĝin inventis Kirkpatrick McMillan, sed tiu rakonto baziĝas pli verŝajne sur ĵurnala raporto pri kurmaŝino dum la 1840-aj jaroj. Ankaŭ ekzistas falsa historio pri invento far Leonardo da Vinci.

Dum la postaj jaroj estis du ĉefaj direktoj de evoluo. Unue, la deziro de pli malpeza maŝino instigis la disvolviĝon de novaj fortikaj kaj risortaj ŝtaloj. La radojn oni konstruis el metalaj spokoj en streĉo. Streĉitaj spokoj povus esti pli maldikaj, kaj la pezo de la biciklo pendis de la rado, kiu helpis al komforto. Lagrojn kun ŝtalaj globetoj oni fabrikis unue por bicikloj.



Due, pro tio ke la pedaloj estis fiksitaj al la rado, la maksimuma rapido dependis de la larĝo de la rado. Radoj do pli kaj pli larĝiĝis ĝis la grandeco de la altbikloj, kies radolarĝojn limigis nur la gamba longo de la rajdanto. Tio evoluo tamen portis kun si danĝerojn – altbikloj nesezure bremsis, kaj ofte okazis akcidentoj kiam la rajdanto falis dum rapidaj malsupreniroj, kiam ne plu eblis restigi la piedojn sur la pedaloj.

Dum la 1880-aj jaroj aperis la lasta grava paŝo la la moderna biciklo – la ĉena pelsistemo. Ĉenoj jam aperis antaŭe sur tricikloj. Tamen ĉeno kiu ligis malsamajn larĝojn de dentorado permesis ŝanĝon de la turnrapido de la pelrado, kaj liberigis la biciklon de larĝaj radoj. La “sekura” biciklo de Starley en 1886 furoris tra la mondo, la unuan fojon aĉetebla kaj rajdebla de ĉiuj. Ĝi eĉ donis sian nomon “Rover” al la pola vorto por biciklo: *rower*.



Dum la postaj jaroj aldoniĝis pluaj inventaĵoj kiuj plibonigis ĝin:


pneŭmatikojn – inventitajn ne de Dunlop kiel multaj supozas, sed de alia skoto, Thomson, en 1845. Rapidumoj ĉenŝaltaj kaj ennabaj aperis en la 1890-a jaroj, kaj la biciklo evoluis (kaj evoluas) plu.

Tamen kial mi kuraĝas aserti ke la biciklo kreis la modernan mondon? Diverskiale – ni komencu per la plej evidenta.

La biciklo estis la unua persona veturilo kiu liberigis la homon, ne nur de la tuja ĉirkaŭaĵo, sed ankaŭ de la limigoj de la aliaj vojaĝmetodoj de la epoko: la horaroj de la fervoja sistemo, kaj la manĝobezonoj de ĉevaloj. Homoj povus facile viziti lokojn antaŭe nekoneblajn, labori pli fore de la hejmo (aŭ loĝi pli for de la laborejo). La horizontoj plivastiĝis – eĉ geedziĝaj ebloj plivastiĝis. Persona libero pri moviĝo estas esenca parto de la moderna mondo.

Biciklistoj ankaŭ multe premis la registarojn por plibonigoj de la stratoj kaj vojoj por subteni tiun liberon. Post la apero de la fervojo, registaroj malmulte subtenis la stratojn, konsiderante ilin malnovajn kaj eksmodajn, sed biciklistoj estis la unuaj kiuj denove postulis riparojn kaj plibonigojn – jardekojn antaŭ la disvastiĝo de la aŭtomobilo.

Aliaj transportiloj plene modernaj havis siajn radikojn en la bicikla industrio. La unuaj aŭtomobiloj uzis biciklajn teĥnologiojn –



metalspokajn radojn, lagrojn, stirilojn, ktp – kaj ne la furgonajn. Eĉ la aviadaj pioniroj, la fratoj Wright, komencis kiel bicikloriparistoj.



Amasproduktado unue elproviĝis per la bicikla industrio. Oni ofte mencias la usonanon Ford kiel la pioniro de amasproduktado, sed liaj inĝenieroj vizitis biciklofabrikojn en Usono, Britio kaj aliloke por lerni pri la amasproduktaj metodoj. La bicikla industrio plene disvolvis la teĥnikojn de interŝanĝeblaj partoj ripeteble fareblaj.

Eĉ la financan mondon, biciklovendistoj estis inter la unuaj, kiuj uzis “luaĉetajn” kontraktojn, kiam la aĉetonto, ne havante sufiĉan monon por tuja aĉeto, pagas komencan frakcion de la prezo, kaj poste regule pagas por finfine posedi la varon.

Oni foje rakontas ke bicikloj kontribuis al la movado por la liberiĝo de virinoj. Certe la deziro bicikli helpis peli la movadon por “racia vestado”, kiu estis parto de la pli ĝenerala liberiĝa kaj voĉdonpostula kampanjoj. Tamen ĉu bicikloj vere motoris tiujn estas

iom dube. Ankoraŭ en la disvolviĝanta mondo – kie biciklo ofte estas vidita kiel la unua ŝtupeto al pliriĉiĝo – estas ĉefe la viroj kiuj posedas kaj uzas ilin.

Malgraŭ tio, pro la aliaj puŝoj, kiujn bicikloj donis survoje al la moderna mondo de la frua 20a jarcento, mi ne timas reaserti, ke la biciklo kreis la modernan mondon.

Tradukaj Defioj

Ankoraŭ vi, plej kleraj legantoj, ne provis la ĝis nun prezentitajn tradukajn defiojn! Kial ne karaj lertuloj? Ja komprenindas ian enangligon timi – la angla malpli facilas ol Esperanto pro ĝiaj jam iel fosiliĝintaj esprimoformoj. Sed en Esperanton, ĉu vere troe? Do venu, homoj, alprenu la ludon, ĝuu la strebojn por ĝustajn vortojn kaj vortumojn kunĉizi ... kaj poste sentu la memfieron de via venko!!

Nu, por helpi vin ĉiujn timemajn tradukemulojn la ĉi-fojaj defioj estos malpli longaj ol la pasintaj. Jen certa mordebla dikpeco, ĉu ne?

Jen la du tradukotaĵoj por la ventontaj monatoj:

A. Ĉirkaŭ li nun konstante ŝvebas stranga duonlumo kaj atmosfero, kiun li ne konas. Li sekrete batalas kun iu mistera fremdulo. La grundo sub liaj plandoj ne plu ŝanceliĝas, sed male, ŝajnas, ke ĝi entute ne ekzistas, kvazaŭ la piedoj irus ne tuŝante ĝin. Kaj dum li en iu pli varma tago falĉas sian mulmultan ordeon, en lia kapo subite aperas la penso, ke la malamiko estas malice sur lia dorso, kun la celo levi lin pli alten de la tero, pli alten en la aeron, kiu estas nekonata al li kaj kie devas esti pli obskure ol ĉi tie malsupre en la hela krepusko.

- El 'Laktisto de Mäeküla' de Eduard Vilde

B. I took a deep breath. This wasn't the time for ranting. Sam would be down in a minute. I could see Larry through the window, mooching up the yard, throwing his fag end down and screwing it into the ground with the toe of his boot. I wanted to strangle both of them. When I thought the worst that could happen was Duncan wasting money on crappy caravans and cartridge presses, it seemed we were setting up business as cannabis dealers.

- El 'Truestory' de Catherine Simpson

Bonvolu sendu viajn provojn al la sekvaj retadreso:

enEsperantigoj al ed-robertson@teleosvet.co.uk; enAngligoj al hju_rid@yahoo.co.uk antaŭ la 31a de marto 2016.

Kalendaro

Enbritaj Eventoj

10 – 12. junio 2016

111a Skota Kongreso de Esperanto, Glasgovo. Okazos en la stacidoma konstruaĵo ĉe Pollokshaws West stacio, nur 10 minutoj trajne de la centra stacio en Glasgovo kaj tial interesos niajn fervojistajn samideanojn. La programo inkluzivos gastparolanton **Cyrille Hurstel** el Francio, eblojn eksursi en la apuda Pollok Park aŭ en la urbocentron per la ofta trajnservo. Vidu la aliĝilon supre aŭ viziti la retejon pro pliaj detaloj.

Internaciaj Eventoj

13a. aŭgusto – 19a. aŭgusto 2016

Dua Tutkelta Kongreso – Ni kore invitas ĉiujn amikojn festi gaje kun ni, la 20an datrevenon de niaj internaciaj renkontiĝoj, de la 13a ĝis la 19a de aŭgusto 2016. Tiuj renkontiĝoj iĝos samtempe la dua tutkelta esperanta kongreso. La unua okazis en Skotlando antaŭ 2 jaroj kaj nia bretona teamo fieras malkovrigi al niaj keltaj kuzoj la riĉecon de nia kelta kultura heredaĵo.

Subtenita de la departementa asocio 'Armor Esperanto', ni preparas specialan buntan programon.

Inter diversaj programeroj okazos sakŝalmista koncerto (<http://www.saint-brieuc-district-pipe-band.com/>) en la vilaĝa preĝejo kaj gvidita vizitado al bretona sanktula monteto en Carnoet (<http://www.lavalleedessaints.com/>).

Ĝis baldaŭ en Pluezek 2016 por partopreni en la dua tutkelta kongreso de Esperanto. ...

